

La Chaux-de-Fonds

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 563, 1974.07.24 & 27

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni regule mencias la nomon La Chaux-de-Fonds, ĉar en tiu urbo ekzistas ekde 1967 grava interlingvistika dokumentejo nomata **Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale**, mallongigo CDELI, kaj ĉar ekde tiu ĉi jaro tiu urbo fariĝis la sidejo de la sekretario de Kultura Centro Esperantista kaj de ties Internacia FERIA Altlernejo, mallongigoj KCE kaj IFA.

A.- Kiel partoprenontoj al la kurssesioj de IFA, vi certe havos la okazon konatiĝi kun la urbo La Chaux-de-Fonds kaj kun ties montaraj ĉirkaŭaĵoj. Eble vi reagos kiel sinjoro Reinhard Hauptenthal, kunlaboranto de CDELI kaj de KCE, kiu skribis en junio ĉijara : « *La koro de KCE troviĝas en tiu mirinda Ĵuraso, kiu, ekde la momento kiam mi konatiĝis kun ĝi, altiradis min magnete.* »

Cl.- La venontan semajnon ni priskribos je via intenco tiun montaron Ĵuraso kaj ties migrad-eblecojn. Hodiaŭ ni unue prezentos al vi la urbon La Chaux-de-Fonds.

A.- Tiu urbo estas la rezultato de la horloĝ-industria koncentriĝo. Ĝis la 18-a jarcento la loĝantoj de Ĵuraso estis samtempe kamparanoj kaj horloĝistoj. La varman sezonon ili deĵoradis sur la kampoj kaj en la arbaroj, fojnante kaj refojnante, migrante sur la komunaj paŝtejoj kun la brutaroj, ekspluatante la torfon de la marĉoj kaj la lignon de la arbaroj. Je la anonco de la longa vintro ili retrovis la horloĝistan labortablon. Dum viglis la babiladoj la viroj fabrikis ĉiujn erojn de horloĝoj muraj kaj poŝaj, kaj la inoj puntis, kudris, trikis kaj ŝpinis. Ofte iu laŭtleĝis : la Biblio, Voltaire kaj Jean-Jacques Rousseau estis intime konataj de tiuj montanoj. Printempe migremaj junuloj rikoltis la produkton de la vintra laboro por viziti la ĉefajn eŭropajn foirojn.

Cl.- La industria revolucio de la 19-a jarcento alportis profundajn ŝanĝojn : la ĵurasanoj devis forlasi unu el siaj okupoj profite al fakiĝo en la alia. La vilaĝo La Chaux-de-Fonds iom post iom kreskis fariĝante horloĝ-industria urbo. Dume la ĉirkaŭaj vilaĝoj loĝantare malkeskiis. Tio protektis ilin kontraŭ la malbeliĝo propra al la amaskonstruado de laboristaj loĝkvartaloj. Tiel la ĵurasaj vilaĝoj konservis sian proprecon, Dume La Chaux-de-Fonds akiris tipan karakteron de laborista urbo fizike kaj spirite. Dum viciĝis la tri-etaĝaj amasloĝejoj domoj laŭ damtabula plano propra al la urbanismo de la epoko, en la cerboj de la urbanoj enradikiĝis novaj ideologioj, kiuj ludis ĉefrolon en la disvolviĝo de la svisa kaj eĉ eŭropa politika vivo, influante ĉu la anarkiisman pensmanieron, ĉu la naskiĝantan kooperativismon, ĉu la socialismon kaj ties luktojn, ĉu la sindikatojn, ĉu la laikiĝon de la instruado.

A.- Ankoraŭ nun la urbo La Chaux-de-Fonds restis larĝe malfermita al la novaj ideoj. Pro tio verŝajne la interlingvistika dokumentejo CDELI kaj nun Kultura Centro Esperantista kaj ties Internacia FERIA Altlernejo estis konsiderataj kiel bonvenaj de la aŭtoritatoj de la urbo. Tiu ĉu urbo sitaŭanta je mil metroj super la marnivelo tamen ludas ĉefrolon en la kultura vivo de franclingva Svislando, kvankam ĝi ne posedas universitaton. Ne multaj kvardek mil-loĝantaraj urboj posvadas tiom bone ekipitajn bibliotekojn kaj fakajn lernejojn ; teknikajn lernejojn, artlernejojn, gimnazon, konservatorion, tiom da muzeoj, tiom da kulturaj organizaĵoj. Inter ili ni menciuj muzik-, teatr- kaj sport-societojn. La preleg-societo *Club 44* (Klubejo kvardekkvar),

kiu organizas po du prelegojn ĉiusemajne kaj venigas parolantojn el la tuta mondo, estas heredanto de la diskutemo, kiu karakterizis la montanojn de la 18-a jarcento.

Cl.- Oni ne venas al La Chaux-de-Fonds por viziti mezepokajn kvatalojn, En tiu epoko domaro apenaŭ ekzistis, kaj fine de la 18-a jarcento triono de la tiama urbeto brulis dum drama incendio. La moderna urbo estas karakterizata de vasta avenuo nomata *Léopold-Robert*, laŭ la nomo de famiĝinta pentristo. Tiu stratego kun larĝaj trotuaroj kaj centra aleo, kie la veturado dividiĝas sur du larĝaj unudirektaj vojoj, estas la ĉefa arterio de la urbo. Ĝi estas ne nur ŝatata promenejo. Ankaŭ ĝi estas la rendevuejo de la ĉefmagazenoj, de la komerca kaj banka vivo. La aliaj paralelaj kaj perpendiklaj stratoj konservis ĝis hodiaŭ karakteron de loĝkvartaloj. Nur kelkaj el ili iom post iom fakiĝis por ludi la rolon de trafikvojo : la ĉefa el ili, la strato *Numa-Droz*, portas la nomon de famiĝinta prezidinto de la svisa federacia registaro, radikalulo kaj defendinto de liberala laikismo. Estas sur tiu strato, ke troviĝas la urba biblioteko, kiu gastigas la interlingvistikan dokumentejon CDELI.

A.- La sportistoj trovas en La Chaux-de-Fonds ne nur la klasikajn futbalajn ludejojn, sed ankaŭ sketejon, kie oni povas glitkuri la tutan jaron, naĝejon ĉirkaŭatan de vastega areo rezervita al la aerumado, ĉeval-kurejon, kampingejon en arbaro, gimnastikan kurekzercejon, ktp. Vintre skilifto lumigita nokte permesas al la skiemuloj praktiki sian sporton eĉ dum la vesperaj horoj. Kaj vegoj por nordskiado favoras la marŝadon en la kamparo.

Cl.- Tiu urbo en la montaro, kiel ni jam menciis, ĝi situas je mil metroj super la marnivelo, ne estas ĉirkaŭata de vilaĝoj. Pro tio ĝi donas la impreson kuŝi meze de la kamparo. El iu ajn loko de La Chaux-de-Fonds estas eble en ne pli ol dekkminuta piedirado atingi la paŝtejojn kaj arbarojn, kiuj karakterizas la montaron Ĵuraso.

A.- Tiu priskribo de la urbo La Chaux-de-Fonds vin instigu esti partoprenonto al la kurssesioj de Internacia Feria Altlernejo.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!